


67-a jaro n-ro 198 2026:2

la lampiro



Promeno kun Nietzsche
José Mauro Progiante

18^o Congresso Paulista de ESPERANTO

Esperanto e as relações pessoais na era digital



São José dos Campos

26 - 27 setembro 2026

Hotel Ema Palace

R. Jorge Barbosa Moreira, 70

Mais Informações:
evento.easp.org.br



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Enhavo

- 4 | **Vortoj de la redaktanto**
Ek al la jubilea numero
- 5 | **Rakonto**
Vi (polica raporto)
- 6 | **Iom da Filozofio**
Promeno kun Nietzsche
- 10 | **Iom da Poezio**
Ĝardeno (Maria Nazaré Loroca)
- 11 | **Iom da Medicino**
Industrie preparitaj nutraĵoj pliigas la riskojn pri kormalsanoj
- 12 | **Esplorangulo**
Ĉu Belchior, Amyr Klink kaj Nanda Costa lernis Esperanton?
- 15 | **por iom pripensi**
Valoras vivi
- 17 | **Por iom ridi**
Homa ĉeno
- 18 | **Iom da gramatiko**
Akuzativo antaŭ la verbo esti
- 19 | **Iom da Poezio**
Poemo 2 (Pablo Neruda)
- 20 | **Kino kaj aliaj artoj**
La Sekreta Agento
- 21 | **Eltiraĵo**
Heredaj rajtoj en Brazilo en okazo de anstataŭa gravediĝo
- 25 | **Alilande**
Unua Tanzania Esperanto-safaro

la lampiro

67-a jaro n-ro 198 2026:2

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sergio Viana
(psviana@terra.com.br)

Enpaĝigo: José Roberto Tenório

*La redaktanto ne respondecas
pri la subskribitaj artikoloj*



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de marto 1937

Propra sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo
easp.org.br | contato@easp.org.br

Estraro

Prezidanto: Esmeraldo A. Alencar de Lima
Vicprezidantino: Cristina de Claudia Graaf
Sekretariino: Maria Conceição Rodrigues
Kasisto: José R. Tenorio da Silvas

Konsilantaro

Paulo Sergio Viana
José Mauro Progiante

Anstataŭanto

Audino Castelo Branco

Jarkotizo por 2026

Simpla Membro R\$ 200,00
Subtena Membro R\$ 400,00
Ŝtatinterna Membro R\$ 100,00
Virtuala Membro R\$ 50,00

Ek al la jubilea numero

Paulo Sergio Viana

Estimata leganto, ĉi tiu estas la 198-a numero de nia tradicia revuo La Lampiro. Tio kompreneble signifas, ke la julia-aŭgusta numero, post du monatoj, estos la jubilea 200-a numero! Festinde, ĉu vi konsentas?

Nia revuo lanĉiĝis en la jaro 1959, kaj dum tiuj longaj jardekoj neniam ĉesis flagri la lumo de nia kara lampireto. En ĉi tiu momento, ni devas turni niajn okulojn al la aktivuloj, kiuj vivigis ĝin kaj la tutan agado de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo dum la dua duono de la 20-a jarcento. Al ili ni ĉion ŝuldas!

Kiel danki al ili?

Praktika maniero estus produkti vere jubileecan numeron, tuj antaŭ la proksima ŝtata kongreso de EASP, kiu okazos en la urbo São José dos Campos, en septembro 2026. Via ĉeesto kaj aktiva partoprenado estos la plej trafa omaĝo!

Ni klopodu ankaŭ kunmeti aparte riĉan datrevenan 200-jaran numeron! Bonvolu sendi viajn pensojn pri la signifo de tiu atingo en nia brazila movado!

Festi jubilean okazon faras sencon nur se oni kaptas ĝin por pli forte antaŭenpuŝi nian aferon ankoraŭ dum pliaj jardekoj!

easp.org.br/butiko

Negrinjo kaj aliaj noveloj

Monteiro Lobato

Tradukis:
Francisco S. Wechsler | Paulo S. Viana



Vi (polica raporto)

Juan Trepiana



Vi restas tie, rigardante min. Vi ne demandas. Vi nenion ordigas. Vi lasas min paroli kvazaŭ tio sufiĉus, kvazaŭ la parolado ĉion aranĝus. Tio ne okazas.

Temas pri karamelujoj, ĉu Vi memoras? El dika vitro, el malnova domo. Larĝa buŝo. Peza kovrilo, el tiuj kiuj sonas fermante. Eble pro la aero, kiu restas kaptita interne, mi ne scias. Antaŭe, en la domo de preskaŭ ĉiu avo, estis karamelujoj plenaj je dolĉaĵoj. Oni devis enmeti la manon kaj eltiri ilin, foje algluitajn.

En unu el ili restas vortoj, sed kun ostoj. Jes, vortoj kun vertebraro. Kompreneble temas pri vertebro, kaj ili malbone kongruas. Ili sin premas, ili supermetiĝas, ili ne sukcesas firmiĝi. Dum tio, Vi ne ĉesas rigardi min, sed Vi ne parolas al mi.

En la alia karamelujo estas akvo. La fiŝoj estas tie, ili moviĝas senhalte.

Mi enmetas la manon kaj ili pasas. Ili ne deturniĝas. La haŭto ŝanĝiĝas tie interne. Ĝi perdas ion de sia limo. Tio estas la mano de infano tenanta armilon.


Kaj Vi restas tie. Sen ordigi ion, sen interveni. Legante.

Foje la vitro nebuliĝas. Ne ĉiam. Kiam tio okazas, oni ne plu distingas unu karamelujon de la alia. Ili ne miksiĝas, sed io transiras. Ĝi estas minimuma. Ĝi lasas restaĵon.

Aŭskultu min, almenaŭ. Temas pri preciza punkto. La enira truo de kuglo. Rando kiu organizas ĉion ceteran. Tio, kio estis disa, aranĝiĝas ĉirkaŭ tio. Jes, mi scias. Vi nenion diros.

Rando, fino, infano kiu pafmortigis.





Imaga interparolo kun filozoj

Promenado kun Nietzsche
ĉe la bordo de lago de Silvaplana (Svislando, 1883)

Li malrapide promenis en hela sed ankoraŭ malvarma somera tago, sur pado ĉirkaŭ la lago. Kiam mi rekonis lin, pro liaj famaj dikaj lipharoj, mi prezentis min kiel vojaĝanton el la estonteco kaj milde demandis lin, ĉu li povus respondi kelkajn demandojn. Li ŝajnis ĉagrenita pro la interrompo de liaj pensoj, sed scivolemo venkis lian reziston.

— Ĉu mi rajtas promeni kun vi dum kelkaj minutoj?

— Jes, kondiĉe ke vi ne petu konsilon pri kiel esti feliĉa.

Ĉi tiu unua konciza respondo ne surprizis min; mi havis impulson rideti, sed tion mi ne faris, timante lian reagon.

— Mi venas el epoko de senfinaj informoj. Tiam homoj juĝas ĉion en ĉiu momento. Kiel vi sentus vin tiutempe?

— Malbona, certe. Tio signifas, ke la malsano de la mondo kreskos. Kiam ĉiu havas opinion pri ĉio, penso jam estas anstataŭigita de reflekso. La supera spirito bezonas longajn silentojn, longajn solecojn.

Tiam mi faris la komenton, kiun mi zorge preparis, por akiri informojn pri la persona vivo de la filozofo en tiu momento de lia vivo, jam en la lasta jardeko de lia mensa saneco.

— Vi konstante ŝanĝas urbojn, pensionojn, klimatojn... Tio igas onin pensi pri fuĝo. Tamen, vi ĉiam skribas kvazaŭ en batalo, atakante.

— Ne fuĝante. Serĉante minimumajn kondiĉojn por pensi, pro miaj kapdoloroj, vomemo, sendormaj noktoj... Mi skribas atakante ĉar iuj veroj antaŭeniras nur armitaj. Idoloj ne estas renversitaj per ĝentileco. Estas ideoj, kiuj bezonas eniri la mondon kiel martelbatoj.

— Unu el tiuj ideoj estas via konata frazo "Dio estas mortinta", ĉu ne?

— Jes, kaj ĝi ĉiam estas miskomprenata. Ĝi ne estas la fanfaronado de kontenta ateisto. Ĝi estas diagnozo. Mi celis diri, ke la ideo pri Dio — kiel la absoluta fundamento de moralo, vero kaj la senco de la vivo — perdis forton en la okcidenta kulturo.

— Kaj tiel kreiĝis malpleno, kiun povas plenigi la ideo pri la superhomo? Pardonu min, se mia konkludo estas simplisma, sed ĉu ĝi estas ĝusta?

— Malpleno? Malbona konkludo. La homo apenaŭ enterigas unu dion kaj jam serĉas alian, antaŭ kiu surgenuiĝi. La superhomo ne venas por plenigi la lokon de Dio. Ĝi ne estas nova majstro. Post la morto de Dio, ne temas pri adori denove, sed pri krei.

— Estas malfacile por homoj ne asocii la ideon pri la morto de Dio kun ateismo. Kion vi diras pri tio?


— Vulgara ateismo ankoraŭ dependas de Dio: ĝi pasigas sian vivon neante tion, de kio ĝi ne povas liberiĝi. Kio interesus min estas io alia — kio okazos, kiam la homo ne plu povos fidi je ĉielo por pravigi sian moralecon.


— Ĉu tio signifas, ke tiu moraleco, kiu ŝajnis esti bazita sur Dio, fakte estis esprimo de tio, kion vi nomas grega moraleco?

— Ĝuste. Ĝi jam ekzistis. Grega moraleco estas la moraleco de tiuj, kiuj timas forton, diferencon, alton. Anstataŭ admiri tion, kio estas malofta, ili celas malgrandigi ĝin. Ili nomas "bona" ĉion, kio konsolas, egaligas, dresas; ili nomas "malbona" ĉion, kio leviĝas, riskas, kreas distancon. Ili ne povas elteni la fortan spiriton: ili bezonas subigi ĝin.

— Kaj Kristanismo, kial vi kritikis ĝin tiom multe?

— Ĉar ĝi estis la plej granda venko de tiu inversigo de valoroj. En ĝi malforteco estas merito, obeemo estas





virto, sufero estas morala venko. Mi ne kritikis ĝin pro malforteco, sed pro historia forto. Ĝi venkis.

— Vi parolas kiel iu, kiu admiras la grandecon de la malamiko.

— Kompreneble. Nur malsaĝulo kontraŭbatalas tion, kion li konsideras malforta. Mi kontraŭbatalas imponajn malamikojn.

En tiu momento li respondis kun la okuloj turnitaj al la lago kaj kumpremitaj pro la reflektita sunlumo. Mi ankaŭ rimarkis, ke li marŝas pli malrapide, kaj tial mi decidis fari nur kelkajn pliajn demandojn el la multaj, kiujn mi preparis.

— Kaj kion pri via ideo pri volo de potenco? Multaj pensas, ke ĝi estas nur deziro domini aliajn.

— Ĉar ili pensas krude. La volo de potenco estas la impulso ekspansiigi, krei, doni formon, trudi stilon al kaoso. Ĝi povas aperi en la artisto, en la leĝ-donanto, en la pensulo. Kaj, ĉefe, en la homo, kiu regas sin mem. Memregado valoras pli ol regi homamasojn. La plej alta potenco ne estas komandi aliajn, sed fariĝi mastro de si mem.

— Vi eĉ serĉis majstrojn. Vagneron, ekzemple.

— Vagnero estis pasio kaj seniluziigo. Dum kelka tempo, li ŝajnis anonci renovigon de la germana kulturo. Poste mi vidis en li tro multe da teatro, tro multe da Kristanismo, tro multe da Germanio.

— Tro multe da Germanio?

— Jes. Soleneco, naciismo. Mi malfidas patrujojn kiam ili komencas postuli spiritan sindonemon. Mi rezignis mian prusan civitanecon ĉar kelkaj pensoj bezonas aeron sen limoj.

— Estas alia ideo via, kiu timigas multajn homojn: eterna reveno.

— Mi ne parolis pri eterna reveno

por timigi, sed kiel defio. Se ĉiu momento de via vivo devus reveni, eterne, ĝuste kiel ĝi estis — ĉu vi ankoraŭ volus ĝin? Tiel oni mezuras homon: laŭ lia kapablo ne peti korekton por la vivo, sed akcepti ĝin, ami sian destinton, diri jes al tio, kio estas necesa.


— Kaj espero? Ĉu vi ankoraŭ tenas ĝin?

— Mi ne ŝatas tiun vorton. Multfoje espero estas nur anestezilo. Homo suferas, ne agas, ne kreas, ne transformas sin — kaj li nomas tiun prokraston espero. Mi preferas eblecon. Ĉiam estos iuj, malmultaj, kapablaj superi la gregan pensmanieron, krei valorojn, doni stilon al siaj propraj vivoj. Mi skribas por tiuj maloftaj.

— En la estonteco multaj vidos vin kiel tro kritikan homon.

— Ĉar ili konfuzos ordinaran martelon kun martelego. Mia martelo ne estas nur por detruo. Mi frapas idolojn por vidi ĉu ili estas solidaj aŭ kavaj, kaj mi komprenas, ke iuj detruoj liberigas spacon por ke la animo dancu.

Mi vidis, ke mi troigis la demandojn. La laca rigardo de la filozofo montris, ke estas tempo ĉesi. Mi faris nur unu finan peton:



— Majstro, imagu vin antaŭ dudek-unua jarcenta publiko, al kiu vi devas paroli dum tridek sekundoj. Kion vi dirus?

— Ne legu min serĉante konsolon. Legu min kiel oni grimpas monton: kun peno, kapturino kaj maldensa aero. Kaj se, fine, vi estos iom malpli obeema al la idoloj de via tempo, la legado ne estos vana.

José Mauro Progiante



Ĝardeno

Maria Nazaré Laroca

Ni estas semoj el lumoj
plantitaj en argilaj potoj.

Memĝardenistoj,
ni nur bezonas
l'akvon el Amo
por ke ni floru.

La mondo
soifas
kompaton.

Industrie preparitaj nutraĵoj pliigas la riskon pri kormalsanoj

Paulo Sergio Viana

Nuntempe oni multe skribas kaj komentas pri la danĝero engluti tro da industrie preparitaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Multaj studoj estas publikigitaj pri la diversaj problemoj, kiujn ili povas kaŭzi al la homa korpo. Aparte la koro suferas tian damaĝon.

Antaŭ nelonge, usona esploro en Teksaso amasigis datumojn pri pli ol 6000 pacientoj, kiuj havis sanan koron, en la komenco de la studo. Oni grupigis ilin laŭ la kvanto kaj tipo de nutraĵoj industrie preparitaj – de minimumaj kvantoj ĝis la tiel nomataj “ultraprocezitaj” nutraĵoj. Homoj, kiuj plej multe englutis tiajn danĝerajn industriaĵoj (po naŭ porcioj en ĉiu tago!), suferis 67-procente pli altan riskon esti trafitaj de koratako, ikto, kaj koronaria malsano, kompare kun nemangantoj de “ultraprocezitaj” manĝaĵoj.

Tiu risko estis aparte severa por negroj.



Ĉu Belchior, Amyr Klink kaj Nanda Costa lernis Esperanton?

Miguel Bento


Esperantistoj ŝatas kolekti, ripeti kaj trumpeti laŭdojn kaj eĉ nurajn menciojn, kiujn famaj neesperantistoj faras pri nia lingvo. Tial, eĉ preterpase diritaj vortoj pri la afero povas resti en nia kolektiva memoro – kaj ili eĉ estas uzataj por propagandaj celoj!

Malgraŭ la (espereble) atentokapta titolo kiun mi elektis por ĉi tiu artikolo, mi mem restas skeptika kaj kritika pri tiu kutimo. Ĉu vere gravas, ekzemple, ke Olavo Bilac iam opiniis Esperanton "simpla, harmonia kaj duktila lingvo"? Li ja neniam lernis ĝin, kaj eĉ kvar-versaĵon ne verkis en ĝi! Ĉu vi prenas serioze restoracierekomendon faritan de iu, kiu neniam manĝis tie? Cetere, mi eĉ ne scias, ĉu la frazo estas aŭtenta, ĉar mi ne trovis konkretan, fidindan fonton!

Aliflanke, ekzistas ankaŭ kelkaj tiaj mencioj, kiuj tamen forgesigas, aŭ eble neniam estis rimarkitaj de ni. Tial,

ke ili estas interesaj almenaŭ kiel simplaj kuriozaĵoj, mi volas ĉi tie skribi pri tri el ili.

La unuan mi hazarde trovis antaŭ kelkaj jaroj, dum mi priserĉis malnovajn periodaĵojn en la bita kolekto de la Nacia Biblioteko. Temas pri intervjuo de la fama kantisto Belchior, kadre de kiu li asertis la jenon: "Por ripozi mi studas Esperanton kaj pentras orientan kaligrafion"¹. Kredeble kelkaj legantoj siatempe opiniis, ke tiu iom ekstravaganca respondo estas ŝerco, sed mi kredas ĝin sincera – estas sciante, ke Belchior estis klera homo, avida legemulo, scipovis kelkajn lingvojn kaj dediĉis sin al desegno-arto. Tamen bonvolu ne fanfaroni, ke Belchior estis esperantisto – tio estus tro granda salto!



Belchior (1946-2017)



Amyr Klink

La dua trov-aĵo kiun mi volas prezenti al vi estas ne el polva ĵurnalo, sed el ege furora libro. Pro tio, eble ĝi fakte jam estas konata de kelkaj, sed mi mem tute ne sciis pri ĝi ĝis Lucca Lanzi atentigis min prie, antaŭ iom da tempo. Temas pri la verko *Cent Tagoj inter Ĉielo kaj Maro*, la debuto de la fama ekspediciulo Amyr Klink, en kiu li rakontas sian sensacian aventuron trapasi Atlantikon sola sur remboato. En momento, kiam Amyr klopodas radie kontakti proksiman, grandan ŝipon, legeblas: "Sen respondo, mi provis en la angla, en la franca, eĉ en 'esperanto' (lingvo kiun ni² sekrete studadis por ellabori universalajn 'kaŝslipetojn' en la lernejoj tempoj). Neniu respondo!"³.

Amuza detalo, sed, denove: bonvolu ne anonci, ke Amyr estas esperantisto! Oni komprenas, ke por Amyr la afero estis nur junaĝa ludo, kion cetere sugestas la nomo de la lingvo inter nenecesaj citiloj, kaj la humura vortumo "*universalaj kaŝslipetoj*".

Fakte, tra la jaroj mi observis, ke kelkfoje oni ne nur troigas iun diraĵon

por propagandaj celoj, sed eĉ disvastigas menciojn, opiniojn kaj reportaĵojn pri Esperanto kiuj fakte mise aŭ eĉ moke prezentas la lingvon kaj ties komunumon! Eble la plej komika ekzemplo estas filmeto⁴ de la fama grupo Porta dos Fundos, en kiu Esperanto estas prezentata kiel studobjekto de absurde ĉarlatana "universitato".

La lasta okazo kiun mi volas komenti estas tia, kvankam ne tiel ekstrema. Temas pri la rolado de la aktorino Nanda Costa en la filmo *Monster Hunter*, lanĉita en Brazilo en 2021. En intervjuo⁵ ŝi asertis, ke Esperanto estas uzata en la filmo, kaj ke ŝi devis parkeri siajn parolojn, dum germana kaj japana kolegoj ja scipovis la lingvon. Pluraj esperantistoj entuziasme disvastigis la informon, des pli ke Nanda aldone asertis, ke ŝi "eĉ sentis sin pli trankvila pro tio, ke la dialogoj ne estas en la angla".


Estas tamen tubero en la afero: fakte oni parolas Esperanton nek en la filmo, nek en la videoludoj kiuj inspiris ĝin! La uzata lingvaĵo estas fakte galimatio kiun la kreantoj de la videoludoj produk-



Nanda Costa

tas laŭokaze. En la kurioza kreoprocezo de tiu galimatio, kiun bone klarigas filmeto farita de fano⁶, povas ludi rolon ankaŭ ordinaraj lingvoj, plej ofte la angla kaj la japana. Sporade oni uzas ankaŭ Esperanton, tiel ke en la fina rezulto povas resti kelkaj rekonblaj vortoj — sed ne pli ol tio!

Cetere, en aliaj intervjuoj Nanda elmontris eraran komprenon pri la realo de Esperanto⁷, kaj deklaris⁸, ke al ŝi "Esperanto alportis ian komforton, ĉar fine mi konas neniun, kiu regas tiun lingvon". Nu, por mi tio estas malprofesia kaj eĉ ofenda komento, sed eble mi estas tro sentema... Ĉiuokaze, tiuj kiuj spektis la filmon eltrovis, ke ŝi estas sekundara rolulo kaj apenaŭ parolas! Kaj la filmo mem estis fiasko kaj kritike kaj finance, kvankam mi mem ne vidas grandan diferencon inter ĝi kaj similstilaj filmoj.



Nu, pardonu ke ĉi-foje mi finas per galo kaj grumblado! Sed ja gravas, ke ni taŭge konduitu rilate la ĉeeston de Esperanto en la gazetaro. Aŭtentajn kaj pozitivajn menciojn ni disvastigu kaj konservu en niaj arkivoj, falsajn informojn ni dementu, kaj negativajn menciojn ni laŭnecese ignoru aŭ respondu. Pli leĝeran temon mi traktos en la venonta numero!

1 Um *baihuno* latino-americano. Pioneiro (Caxias do Sul - RS), 4-5/nov/1993. Disponebla en: <http://memoria.bn.gov.br/docreader/885959/178545>

2 *Ni* (mi kaj la lernejaraj kolegoj), aŭ eble simple *mi* (la frazo en la portugala estas ambigua).

3 KLINK, Amyr. *Cem dias entre céu e mar*. 33ª edição. São Paulo: Companhia das Letras, 2015; p. 190.

4 <https://www.facebook.com/veigadealmeida/videos/1808157539258151/>

5 Nanda Costa faz estreia internacional em "Monster Hunter". *Diário de Cuiabá*, 26/02/2021. Disponebla en: <https://www.diariodecuiaba.com.br/ilustrado/nanda-costa-faz-estrela-internacional-em-monster-hunter/566150>

6 <https://www.youtube.com/watch?v=bu6qXWgyeFI>

7 <https://www.youtube.com/watch?v=V91vo4fy6GU>

8 Nanda Costa em entrevista exclusiva. *Revista Regional*, 30/04/2021. Disponebla en: <https://revistaregional.com.br/site/2021/04/30/nanda-costa-em-entrevista-exclusiva/>

Valoras vivi

Milton Paulo de Lacerda

Sed vivi entuziasme, pasie, ĝoje. Neniu naskiĝis sciante ĉion. Necesas ekscii kial, la valoron de ĉiu peco de ĉi tiu timige granda ilaro, kiu konsistigas vivon kaj ekziston, la tutan universon kie ni estas merĝitaj. Ni ne bezonas senti nin kiel ŝipetoj, ĵetitaj de flanko al flanko per ondoj de duboj kaj malhono. Ni povas, ni vere bezonas konstati, ke indas esti ĉi tie en ĉi tiu pli-malpli freneza aventuro por naskiĝi, kreski, multobligi kaj... morti.

Estas en ĉiu homo la senco de eterneco, kiu antaŭenĵetas senlimajn eblecojn por persona plenumo. Ne estas bonguste, ne estas kontentige vivi malbonete, pli malplie, kvazaŭ ni estus terpomaj sakoj intencitaj nur por servi en la kuirejo de la homaro. Ne klaras, ke la vivo elfluas tra la fingroj, kaj ke ni ankoraŭ ne plenumas la tutan nekredeblan potencialon, kiun ni sentas en nia plej intima konscio.

Ĉi tio estas pli ol pasio, ĝi estas la plej sincera amo, ĉar, kiel diris la brazila

verkisto, Jorge (Ĵorĵe) Amado, "Eĉ la plej forta pasio havas sian vivon".

Nek ŝajnas, ke la malfacilaĵoj estas malhelpoj, kiujn ni ne povas superi. "Pasio pliiĝas pro la obstakloj, kiuj kontraŭas ĝin", diris Ŝekspiro. La vivo estas pli grava ol ĉio alia, postvivado estas la plej instinkta reago, kiun oni povas trovi en ies ajn historio.

Kial do vi kaj mi ekzistas? Kial homoj amas aŭ malkonsentas? Kial iuj homoj studas, laboras, amuziĝas, vojaĝas? Kial ni helpas aliajn, kial ni atendas kaj eĉ ofertas nin? Inter multaj senfinaj demandoj — efektive, pri ĉio ni povus ripeti la vorton "Kial..." — kial mi skribas ĉi tiujn liniojn? Kio pelas nin forlasi nian komfortan zonon, eliri, renkontiĝi, batali ĝis la punkto de elĉerpiĝo? Certe io grava kuŝas antaŭ ni.

Mi memoras la gazetan karikaturon, kiu prezentis dolĉan hundeton kurantan sur turnanta irtapiŝo, volantan atingi bongustan kolbason pend-

antan kaj neatingeblan antaŭ si. En kies nomo? La demando povas esti plurmaniere multobligita. En kies nomo regas la potenculo? En kies nomo administras la administrantoj? En kies nomo la policisto kontrolas la trafikon? En kies nomo oni parolas de katedro, predikejo aŭ radiomikrofono? En kies nomo gepatroj aŭ pastroj pardonas? En kies nomo vojaĝagentoj decidas, nuligante aŭ rekomendante flugojn ĉe flughaveno? Ĝis nun, la demando pridubas la fonton de aŭtoritato, kaj povas esti tradukita kiel: Kiu, finfine, donas al vi la potencon fari tion, kion vi faras?

Du demandoj prezentas sin en la vivo, kiel du sagoj, direktitaj en kontraŭaj direktoj, sed kompletigantaj unu la alian por nia persona sekureco. La unua estas KIAL. Ĝi estas direktita al nia pasinteco, al niaj originoj. Ĝi devenas de la anksieco koni nin mem kaj malkovri la kialojn, kiujn ni havis por

fari tion aŭ tion, same kiel por ne fari tion kion ni intencis. Ĝi klarigas la fonton de niaj decidoj, serĉante la plej profundajn, foje nekonsciajn kialojn, kiuj estigis nian personan agadhistorion kaj niajn preterlasojn.

La dua demando estas POR KIO. Ĝi projekcias nian atenton antaŭen, al la estonteco de niaj revoj, al la sekvoj de niaj iniciatoj. Krome, ĝi certigas la signifon de tio, kion ni intencas fari. La kutimo turni al ni mem ĉi tiun demandon evoluigas klarecon pri niaj celoj kaj alportas plian fidon al niaj agoj. Plue, ĝi plifortigas nian ĝustan Intencion, sintenon tiel gravan por aprezi tion, kion ni faras. Estas malofte trovi homojn tiel atentajn al la vivo kaj kutimitajn pensi, ke ili rutine demandas al si ĉi tiujn du demandojn de alta psikologia valoro. Sed gravas, ke ni kutimiĝu demandi ilin, kiel konsciaj homoj, por ke nia tempo sur la tero akiru pli da solideco kaj signifo.



Homa ĉeno

(Nekonata aŭtoro)

El la itala esperantigis James Rezende Piton

Bankestro diras al sia sekretario: "Mi bezonas iri al nia eksterlanda filio dum unu semajno kaj mi bezonas, ke vi akompanu min en tiu laborvojaĝo. Bonvolu organizi ĉion."

La sekretario vokas la edzon: "Karu-lo, mi bezonas akompani mian ĉefon en laborvojaĝo por unu semajno. Mi esperas, ke vi bone restos."

La edzo skribas al sia amantino "Mia edzino forestos unu semajnon, ni pasigu ĝin kune, mia reĝino..."

Ŝi, instruistino, diras al sia privata lernanto: "Mi havos multe da laboro venontsemajne. Ni ne povos havi klasojn."

La knabo skribas al la avo: "Avĉjo, la venontan semajnon mi ne havos klasojn, mia instruistino ne povos instrui. Ĉu ni pasigu tiujn tagojn kune?"

La avo (la bankestro) vokas la sekretariojn kaj diras: "Mi prefere pasigu la

semajnon kun mia nepo, infanoj tro rapide kreskas. Ni lasu la vojaĝon por alia okazo, bonvole."

La sekretario telefonas al la edzo: "Planoj ŝanĝitaj, mia ĉefo petis min nuligi la vojaĝon."


La edzo skribas al sia amantino: "Ni ne plu povos pasigi kune la venontan semajnon. Mia edzino estos hejme."

La instruistino vokas la knabon, sian privatan lernanton, kaj informas: "Ŝanĝoj de planoj: ni havos la kutimajn klasojn en la venonta semajno."

La knabo skribas al la avo: "Avĉjo, mia instruistino ŝanĝis la planojn kaj mi havos la normalajn klasojn. Pardonon, mi ne povos iri ĉe vin."

La bankestro refoje vokas sian sekretariojn kaj diras "Mia nepo ĵus rakontis, ke li ne plu povos veni la venontan semajnon. Bonvolu repreni niajn originalajn demarŝojn por la vojaĝo..."

Lingvaj Respondoj de Francisco Wechsler



Demando

Sur la 9-a paĝo de la Unua Parto de la verko “La Batalo de l’ Vivo”, en traduko de Zamenhof, aperas la jena frazo: *Ĉu vi ne scias, ke ĉiun tagon estas ies tago de naskiĝo?*

Ĝi aspektas iom strange, ĉar li uzis akuzativon antaŭ la verbo esti. Ĉu vi povus komenti tiun frazon?

Respondo

Malgraŭ la impreso ricevita de la demandinto, la frazo estas normala kaj laŭgramatika. Ĝian signifon oni povus fari pli klara jene: *Ĉu vi ne scias, ke **en ĉiu tago** estas ies tago de naskiĝo?* Eĉ pli klare estus diri: *Ĉu vi ne scias, ke **en ĉiu tago ekzistas** ies tago de naskiĝo?* Aŭ ankoraŭ pli klare kaj pli

elegante: *Ĉu vi ne scias, **ke en ĉiu tago okazas** ies tago de naskiĝo?*

Kvankam Zamenhof tradukis el la Germana traduko, ĉar li ne bone scipovis la Anglan, mi citas la originan frazon: *Don’t you know **it’s always** somebody’s birth-day?*

Poemo 2

Pablo Neruda

En via morta flamo la lumo vin ĉirkaŭas
Absorbita, malsana pala, tiel turnita
kontraŭ la malnovaj helicoj de la krepusko
kiuj ĉirkaŭ vi turniĝas.
Silenta, mia amikino,
sola en la soleco de ĉi tiu horo de mortoj
kaj plena je la vivoj de la fajro,
pura heredantino de la detruita tago.
De la suno falas fasko sur via malhela vesto.
De la nokto la grandaj radikoj
subite kreskas el via animo,
kaj ekstere revenas la aferoj en vi kaŝitaj,
tiel ke pala kaj blua popolo
el vi ĵus naskiĝinta sin nutras.
Ho grandioza kaj fekunda kaj magneta sklavo,
cirklo kiu en nigro kaj oro aperas:
levita, teksas kaj ĝuas tiel vivan kreaĵon
ke viaj floroj pereas, kaj vi estas plena je malĝojo

(ĜSPERASNTIGIS JOĖ BAZÍLIO)

La Sekreta Agento

Anna Lobo de Carvalho

Originala nomo: O Agente Secreto

Direktoro: Kleber Mendonça Filho

Aktoroj: Wagner Moura, Tania Maria, Maria Fernanda Candido

Tipo: Dramo, Politika Suspenso

Lanĉo: Brazilo, 2025

Tempodaŭro: 158 min.

Mi estas ankoraŭ en la etoso de ĉi-jara Oscar, kiu laŭ mi estis pli justa ol pasintjare, ĉu vi ne konsentas? Malgraŭ tio ke la Brazilaj indikoj ne gajnis fine, estis nekredible ke ni estis indikitaj je pluraj kategorioj kaj en du jaroj sinsekve! Tio ne kutime okazas, nur tri landoj tion atingis ĝis nun! Mi kredas ke tio malfermis spacon por la sekvaj brazilaj filmoj, kaj ne nur en Oscar.

Kiel vi povas imagi, hodiaŭ mi parolos pri la genia lasta filmo de Kleber Mendonça Filho – La Sekreta Agento. Ĝi parolas pri Marcelo – kiu fuĝas pro danĝera kaj malfacila situacio el San-Paŭlo kaj iras al Recife. Planante rekompenci la vivon, li alvenas al speco de



komuna loĝejo de la mirinda rolulino sinjorino Dona Sebastiana. Li ŝanĝas sian nomon kaj komencas labori plej kviete laŭ eble, dum li iĝas ĉasita por esti mortigita, meze de diktatura epoko de Brazilo.

Iom post iom, meze de la informoj kiujn oni havas tie kaj tie ĉi, oni iom post iom muntas kadron, kiu ne vere iĝas sufiĉe plena. Ni iĝas ankaŭ sen la memoro, kiel la ĉefa rolulo, ĉasante

(Daŭrigota sur la paĝo 24)

Heredaj rajtoj en Brazilo en okazo de anstataŭa gravediĝo

(Kunmetis João Otávio Veiga Rodrigues)

1. Enkonduko

La tekniko de asistata reproduktado konata kiel **anstataŭa gravediĝo** (populare nomata “*barriga de aluguel*”) okazas kiam virino portas embrion por alia persono aŭ paro kun la intenco transdoni la infanon post la naskiĝo. Tiu metodo estas uzata precipe kiam medicina kondiĉo malebligas la gravediĝon de la estonta patrino.

En Brazilo la temo ankoraŭ ne estas detale reguligita per specifa leĝo. Pro tiu jurista vakuo, la praktiko estas regulata ĉefe per etikaj normoj de la Federacia Konsilio pri Medicino kaj per juĝaj decidoj.

Tiu situacio kreas plurajn demandojn en la kampo de familia kaj hereda juro, inter kiuj:

- kiu estas la jura patrino de la infano;
- kiel estas determinata la filiĝo;

- kaj ĉu la infano havas heredrajtojn rilate al la sociaj aŭ genetikaj gepatroj.

2. Jura Situacio de Anstataŭa Gravediĝo en Brazilo

La brazila jura ordo ne permesas komercan kontrakton por “lui uteron”. La proceduro estas akceptata nur en solidara formo, sen pago al la virino kiu portas la gravedecon.

La ĉefaj principoj aplikataj estas:

1. **Malpermeso de komerca karaktero** – la proceduro ne povas esti fonto de profito.
2. **Familia rilato inter la partoj** – ofte oni postulas parencecon ĝis la kvara grado.
3. **Medicina neceso** – oni uzas la teknikon kiam la patrino ne povas gravediĝi.

La manko de eksplicita leĝaro signifas, ke multaj konfliktoj estas solvi-

taj per interpretado de la civila kodo kaj de la konstituciaj principoj pri homa digno kaj familia protekto.

3. Filiĝo kaj Jura Gepatreco

La demando pri **filiĝo** estas fundamenta por heredrajtoj. Tradicia principo de la civila juro diras, ke **la patrino estas tiu, kiu naskas la infanon**. Tamen en kazoj de asistata reproduktado la tribunalo ofte agnoskas la t.n. **intencan aŭ socian patrinecon**, tio estas, la personon aŭ paron kiu planis la gravediĝon kaj estos la gepatroj de la infano.

Brazila jurisprudenco jam agnoskis:

- registradon de infano kun **du patroj** en kazoj de samseksa paro kun anstataŭa gravediĝo;
- rekonon de la sociaj gepatroj kiel la juraj gepatroj de la infano.

Laŭ tiu koncepto, la graveda virino ne estas konsiderata patrino en la jura senco, sed nur la persono kiu portis la gravedecon.

4. Heredrajtoj laŭ la Brazila Civila Kodo

La **heredjuro** en Brazilo regas la transdonon de la posedaĵoj post morto de persono. La Civila Kodo establas kelkajn gra-vajn principojn:

- la heredo transiras al heredantoj tuj post la morto de la posedanto;
- ankaŭ la **naskoto** (infano jam konceptita sed ankoraŭ nenaskita) havas protektatajn rajtojn.

Por heredrajtoj estas esenca detemini la filiĝon de la infano.

5. Heredaj Rajtoj de Infanoj Naskitaj per Anstataŭa Gravediĝo

Se la tribunalo aŭ civila registro agnoskas la sociajn aŭ genetikajn gepatrojn kiel la jurajn gepatrojn de la infano, tiam: **la infano havas la samajn heredrajtojn kiel ĉiu alia infano**.

Tio signifas ke:

1. la infano estas **legitima heredanto** de siaj gepatroj;
2. li aŭ ŝi povas ricevi heredaĵon laŭleĝe aŭ per testamento;
3. li aŭ ŝi ankaŭ estas protektata kiel **neplenaĝa heredanto**.

La deveno per asistata reproduktado ne nuligas tiujn rajtojn.

6. Specialaj Problemoj

Kelkaj komplikaj situacioj povas aperi:

a) Postmorta reproduktado

Se embrio estas enplantita post la morto de unu el la gepatroj, la deman-

do aperas ĉu la infano povas heredi.

La civila kodo permesas heredon ankaŭ por **infanoj ankoraŭ ne konceptitaj**, se tio estis antaŭvidita en testamento kaj se la koncepto okazas ene de difinita periodo.

b) Konflikto inter graveda virino kaj intencaj gepatroj

Se la graveda virino rifuzus transdoni la infanon, povus okazi konflikto pri patrineco kaj, sekve, pri heredrajtoj.

Tiaj kazoj estas kutime solvataj de la tribunaloj laŭ principoj de:

- la plej bona intereso de la infano,
- la projekto de gepatreco (projeto parental).

7. Konkludo

La temo de heredrajtoj en kazoj de anstataŭa gravediĝo en Brazilo ankoraŭ estas evoluanta. Pro la manko de specifa leĝo, la solvoj dependas de:

- la interpreto de la Civila Kodo,
- medicinaj etikaj normoj,
- kaj jurisprudenco.

Tamen la ĝenerala tendenco de la brazila juro estas klara:

infano naskita per asistata reproduktado devas havi la samajn familiajn kaj heredajn rajtojn kiel ĉiu alia infano, sendepende de la tekniko uzita por lia aŭ ŝia koncipiĝo.

HEREDAJ RAJTOJ DE INFANO NASKITA DE LUPATRINECO

La brita paro Ceawlin Thynn kaj Emma Thynn, markizoj de Bath, prezentis juĝan aferon ĉe tribunalo en Bristol (Anglio).

La celo de la proceso estas garantii la ontajn heredajn rajtojn de ilia 9-jaraĝa filo, Richard Isaac Thynn. Sino Emma Thynn suferis gravajn sanajn problemojn dum la gravedo de sia unua filo, do kuracistoj malkonsilis al ŝi naski plian idaron, tio sendube povus kaŭzi morton al ŝi. Pro tio, la paro decidis havi novan filon pere de "lupatrino", tio estas, fekundema virino, kiu naskas infanon por alia paro kaj ŝi portas kaj vivnutras en sia korpo ilian feton.

Lupatrineco estas permesata en Britio, kvankam tio ne okazas en multaj aliaj landoj.

El "Jura Semajno":

Do, Richard Isaac naskiĝis en Usono de lupatrino en la jaro 2016. La

familio Thynn havas gravajn bienojn, inter ili eĉ imponan kastelon, kiuj apartenas al fideikomiso. Laŭ la normaro de tiu fideikomiso, povas esti membroj tiuj heredantoj kiuj naskiĝis ene de la familio. Tribunalo devas decidi nun, ĉu la kondiĉo “naskiĝi ene de familio” inkludas ankaŭ tiujn kiuj naskiĝis de lupatrino. Sendube, ĉi tiu graved-sistemo ne estis pripensebla en la jaro 1970, kiam la normoj de la fideikomiso estis redaktitaj. Advokato de la familio Thynn asertis, ke estus kontraŭleĝa ebla diskriminacio de infano pro lia naskiĝo. Do, se la plej aĝa frato de la infano Richard Isaac rajtas future esti membro de la familia fideikomiso, ankaŭ li devas ĝui tiun saman rajton.

OBS: **Fideikomiso** estas jura instituto de hereda rajto, per kiu la testatoro transdonas heredon aŭ posedajon al unu persono (la **fideikomisulo** aŭ **unua heredanto**), kun la devo konservi ĝin kaj poste transdoni ĝin al alia persono (la **fina heredonto** aŭ **substituita heredanto**).

Ekzemplo

Imagu ke avo skribas testamenton:

- Li lasas bienon al sia filo.
- Sed determinas, ke post la morto de la filo la bieno devas iri al la nepo.

La filo estas **fideikomisiulo**, kaj la nepo estas **fina heredonto**.



Daŭrigo de la pago 20

informojn kaj klopodante postvivi meze de la ĥaoso. Iel, oni povas kompreni la elektojn de la reĝisoro, kiam la celo de la filmo estas paroli pri memoro... la forgeso pri nia historio... pri la homoj kiuj subite, ne plu estas tie kaj sen ajna spuro pri tio, kio okazis... kaj kiel tio forskuiĝas, iras el inter niaj fingroj.

Ni ne bezonas paroli pri kiel brile Wagner Moura estas en la filmo. Li

Kino kaj aliaj artoj

estas vere kapabla aktoro. Certe ni ankaŭ ne bezonas paroli pri la koloroj, la filmado mem. Kleber estas ja nekredebla direktoro. La filmo estas ja vere brazila juvelo. Mi konfesas ke estis malfacila filmo por digesti kaj kompreni, sed mi fervore indikas ke vi spektu ĝin, se vi ankoraŭ ne tion faris. Bonan Spektadon kaj ĝis la sekva filmo!

Unua Tanzania Esperanto-Safaro

Partoprenu la Unuan Tanzanian Esperanto-Safaron, kiu vojaĝigas vin de Daresalamo tra la Nacia Parko Saadani, Ngorongoro, Serengeto, la Esperanto-Mezlernejo en Marambeko al Mŭanzo, kie vi partoprenos la Unuan Landan Kongreson de Esperanto en Tanzanio post la 109-a UK.

Tio estas unika okazo sperti la senkomparan pejzaĝon, plantaron kaj bestaron de Tanzanio kaj konatiĝi kun ties juna kaj vigla Esperantomovado. Unu fojon en via vivo vi nepre devas viziti Tanzanion, kie vivis antaŭ du milinoj da jaroj en Ngorongro la unuaj homoj.

Ĉar la homaro estiĝis en Tanzanio, fakte iel ĉiuj homoj sur la Tero estas Tanzanianoj. Do venu hejmen!

La evento ankaŭ taŭgas por komencantoj aŭ komencontoj de Esperanto, ĉar dum la safaro intensive instruos Esperanton. Do, se vi venas kun via partnero, kiu ankoraŭ ne scipovas

nian lingvon, ŝi aŭ li post reveno ankaŭ estos esperantisto.

kontakto:
Dietrich Michael Weidmann
didi@esperanto.ch

Por plia informoj elŝutu la [pdf-broŝuron](#).



36º Encontro Estadual de Esperanto

16 e 17 de maio de 2026

Petrópolis

Tema:

Esperanto: instrumento de educação para a paz

Informação, hospedagem e inscrição no site:

www.aerj.org.br/encontro

organização



apoio



Colégio e Pensionato
Nossa Sra de Lourdes

Av. 7 de Abril, 655, Centro, Petrópolis – RJ